

Robert Ernst Prutz,

## Kristnokto (strofoj 1 - 5)

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1. Sankta Nokto, sur flugiloj  
De anĝeloj venas vi,  
Kaj aŭdiĝas sonoriloj,  
Helajn lumojn vidas mi.  
Plenaj estas la kabanoj  
De ĉiela beno, la  
ĝojaj kantoj de l' infanoj  
Jen jubilas supren ja.

2. Sankta Nokt', kun kantoj viaj  
Kaj kun brilo venas vi  
Ree nun al domoj niaj,  
Kia iam estis vi,  
Kiam palmoj pli susuris,  
Dum krepuske inter si  
Tero kaj ĉiel' murmuris  
Vortojn de l' Evangeli';

3. Kiam per la mano Dia  
Malfermiĝis la ĉiel'  
Kaj prezentis sin al nia  
Vido ties brila hel';  
Kiam por anonc' de l' paco  
Al ni homoj tie ĉi  
Suben de l' ĉiela spaco  
Venis la anĝel' de Di';

...

4. Kiam el la oriento  
La tri magoj pro ador'  
Venis kun donac-prezento  
Al la Filo de l' Sinjor';  
Kiam la Patrin' pensante  
Klinis sin dum nokta hor'  
Al la Filo, jen sentante  
Egan ĝojon en la kor'.

5. Sankta nokt', kun mil kandeloj  
Vin solene levas vi.  
Ho leviĝu, stel' de l' steloj,  
En la koroj pli kaj pli !  
Vidu, brilas nun surtere  
De l' ĉiela amo grac'!  
Regu am', fariĝu vere  
Sur la Tero fine pac'!

*Traduko de la Germana poemo "Christkind (Strophen 1 - 5)" de ROBERT ERNST PRUTZ (\*1816 – †1872) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2003-01-08.*

*MR-394-6 / Arg-170-339 (2013-01-22 22:44:03)*